# Novjorka Prismo

Numero 118 — Novembro 2002

*The Esperanto Society of New York invites you to learn about ESPERANTO, the International Language at its annual OPEN HOUSE!*

**Date:** Friday, November 15, 2002, 6:30-9:00 pm

**Place:** United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

**Program:** 6:30 – Refreshments

7:00 – New York esperantists will present short talks (in English) about Esperanto, its origins, and how it is used today. The program also includes a short lesson, songs in Esperanto, and a videotape about the International Language. Everyone is welcome! Bring a friend! ★

## Protokolo de la kunveno de la 18-a de oktobro 2002

Tomaso ECCARDT oficiale malfermis la kunvenon je la sepa horo ptm. Ĉeestis 13 personoj, neniuj gastoj. Ne okazis raporto de la kandidatiga komitato. La protokolo estis akceptata. Oni rimarkis pri la misliterumado de "Janeiro" en artikolo en *Novjorka Prismo*. Tomaso rimarkis, ke la klaso ĉe K-Mart, ĉe la 8-a strato kaj la 4-a avenuo, okazas dimanĉe kaj komenciĝas je la sesa horo kaj duono ptm.



Post la anoncoj, je 7:15, la personoj, kiuj ĉeestis la semajnfinon ĉe Okemo, Vermont, parolis pri siaj spertoj. [Arnold Victor kaj mi priskribas la semajnfinon en apartaj artikoloj, ĉe paĝo 3.]

Poste okazis diskuto pri volontuloj, kiuj prelegos ĉe la Malfermita Domo dum la novembra kunveno. Rochelle F. GROSSMAN deklamos sian ŝercon pri la patrino de la musoj, kiu povas paroli fremdan lingvon. Aliaj personoj parolos pri la klaso, pri Okemo, ktp. Oni montros vidbendojn.



Je 7:55, Tomaso anoncis, ke okazos estrara kunsido tuj antaŭ la neformala kunveno je la unua dimanĉo de novembro.

Je 8:00, ni komencis la diskutrondon pri la plej ŝatataj landoj de la ĉeestantoj. Tomaso sugestis, ke ni ankaŭ igu ĝin devenludo. Oni iomete priskribis la landon, kaj la aliaj devis diveni la nomon de la lando. Kelkaj landoj estis veraj landoj, aliaj ne estis. Per tiu ekzerco, ni diskutis kaj eklernis pri multaj diversaj landoj.

Je 8:55, Tomaso oficiale fermis la kunvenon. Tuj poste, kelkaj ĉeestantoj iris al la pica-restoracio *Emma's Dilemma* por manĝi kaj trinki. ★

*Protokolis: Stuart GREEN*



Fotis: Nancee Medrano

## IBM Plaza

La 3-an de novembro, 5 el la 7 estraranoj kunvenis je tagmezo por diskuti klubajn aferojn. Ni decidis peti sugestojn de la ĉeestantoj dum la decembra kunveno pri kiel elspezi la heredaĵon, kiun ni ĵus ricevis (vidu apartan artikolon, ĉe paĝo 2). Ni ankaŭ diskutis pri la malfacilaĵoj rilate al trovi estraranojn. Ni pripensos du eblajn ŝanĝojn al nia statuto. Finfine ni diskutis pri la venonta malfermita domo. Post la estrara kunsido, kiel kutime, venis kelkaj aliaj klubanoj por babiladi. ★

*– Tom ECCARDT*

# Laste vizitis . . .

## . . . la tutan mondon!

La 29-an de oktobro vizitis nin du veraj mondvojaĝantoj, Manel VINYALS kaj Joaquim MARCOVAL, el La Senia, Hispanio, kiuj klopodas ĉirkaŭ-vojaĝi la mondon en 80 tagoj. Manel kaj Joaquim sekvas pli-malpli la saman vojon kiel Phileas Fogg kaj Passepartout, la herooj de la fama romano de Jules Verne. Ĉiu vojaĝanto elspezas entute nur $5000 kaj, same kiel en la libro, ili veturas nur per ŝipoj, trajnoj, kaj aŭto(buso)j – ili ne uzas aviadilojn.

Manel kaj Joaquim komencis sian vojaĝon en Londono la 19-an de aŭgusto kaj jam trapasis Eŭropon, Azion, la Pacifikan Oceanon, kaj Usonon. Ili alvenis Novjorkon je proksimume tago 69 de la vojaĝo, kaj restis 3 tagojn ĉi tie antaŭ ol transiri la Atlantikan Oceanon ĝis Southhampton kaj la fino en Londono. Ili pasigis 3 horojn kun Tom Eccardt kaj mi kaj salutas ĉiujn de ESNY. ★

– *Jim MEDRANO*



## Cirkaŭiro de la mondo en 79 tagoj

*Karaj samideanoj:*

Finfine ni finis la ĉirkaŭiro de la mondo en 79 tagoj konkurinte la faman romanon de Jules Verne. Tiu ĉi estis la vojaĝo de la nia vivo, tiu utopia afero, ĉiam sopirata sed sen la momento por fariĝi. Nun ni finis kaj ni havas grandajn kontentigojn pro du kialoj, unue ĉar ni finis la vojaĝon kun grava sukceso, kaj due ĉar ni uzis la Esperantan lingvon kaj ni pruvas, ke Esperanto estas viva lingvo kaj sufiĉe uzata en la tuta mondo por helpi nin en ĉiuj landoj, en kiuj ni estis.

Ni atingis Londonon la 5-an de novembro kaj poste ni prenis aviadilon al Barcelono. La 6-an de novembro ni atingis La Senia, nian vilaĝon, kaj tie ĉi ni havis varman akcepton de ĉiuj loĝantoj kaj de la plej gravaj komunikaj medioj. La sekvantajn tagojn ĉio iris rapide, estis freneza afero ĉar ĉiuj volis intervjui nin.

Dum 3 tagoj ni faris intervjuojn por la plej gravaj televidilaj kanaloj, radioj, kaj ĵurnaloj – ni faris pli-malpli 20 intervjuoj. Ĉiuj demandis surprizitaj pri la Esperanta lingvo kaj ĉiuj kredis, ke ĝi jam estas mortinta lingvo. La propagando de ni lingvo pro nia vojaĝo estas grandega, ni opinias, ne nur en Hispanio, sed ankaŭ en aliaj landoj.

Ĵurnalistoj diras, ke ĉio, kio ne vidiĝas per televidilo, radio, aŭ ĵurnalo ne okazas, kaj nun ni vidas per tiu vojaĝo. Kiam vidiĝis en televidilo nia vojaĝo per Esperanto ĉiuj demandis al ni ĉu Esperanto ankoraŭ estas. Simpla vojaĝo faris multajn propagandojn kaj donas al ni ideon por fari novajn agadojn por atingi, ke Esperanto estu pli konata en la tuta mondo. Ĉiuj esperantistoj devas pripensi ideojn kiuj povos havi grandajn sukcesojn en komunikaj medioj.

Ni preparas nun la vojaĝan libron kaj ni esperas, ke ĝi havos grandan sukceson. Kompreneble ni verkos en Esperanto kaj povos legi ĝin ĉiuj esperantistoj en la mondo. Ni kore volas danki al niaj amikoj pro iliaj helpoj. Sen ilia helpo ni pensas, ke ne povis sukcesi la ĉirkaŭiro de la mondo en 79 tagoj. Dankon al ĉiuj. Ĝis revido.

– *Joaquim MARCOVAL*
*kaj Manel VINYALS*

## Laste vizitis ĉe UN

La 11-an de oktobro Vladimir NAZAROV (Sankt-Peterburgo) vizitis la oficejon de UEA/Novjorko. Post konversacio pri Esperanto en Sankt-Peterburgo, Novjorko, kaj Usono ĝenerale, mi gvidis longan viziton ĉe UN. Vladimir intencis ĉeesti la oktobran kunvenon de ESNY sed lastminute lia familio en Nov-Ĵerzeo aranĝis vojaĝon al Bostono. ★

– *Rochelle F. GROSSMAN*

## Heredaĵoj al ESNY kaj UEA/Novjorko

Granda surprizo okazis kiam UEA/Novjorko ricevis leteron de ELNA lastmonate pri la testamento de John L. LEWINE, konata usona esperantisto kiu mortis la 27-an de aprilo 1982. La letero diris: *"John forpasis antaŭ dudek jaroj, kaj finfine ELNA recevis la finfinan disdonaĵon el lia heredaĵo, ĉi-jare. En sia testamento, John esprimis la deziron, kvankam ne la instrukcion, ke ELNA dividu parton de tiu heredaĵo kun aliaj grupoj, kiuj estis por li gravaj — UEA (precipe por la novjorka oficejo), la AAIE (Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto) kaj la esperantistoj de Novjorko . . . . La sumojn proponis la ELNA Komisiito pri Donacoj kaj Heredaĵoj William R. Harmon, kaj akceptis Alexander Shlafer, la prezidanto de ELNA."* ESNY (la Esperanto-Societo de Novjorko) kaj UEA/Novjorko havas korajn sentojn por karmemora John kaj multe valoras la heredaĵojn.

John estis la unua vicprezidanto, la dua prezidanto, kaj estrarano de ELNA, prezidanto de AAIE, kaj prezidanto dum multaj jaroj de ESNY. Li ankaŭ reprezentis la neregistaran organizaĵon UEA ĉe UN.


John studis ĉe Yale Universitato kaj ĉe la Sorbonne. Dum la dua mondmilito li servis kiel interpretisto ĉe la Supreme Headquarters de la Allied Expeditionary Forces en Londono kaj Parizo. Sperta lingvisto, li instruis lingvojn, multjare en lernejoj de Novjorko. Post emeritiĝo, li loĝis en West Stockbridge, Massachusetts ĝis sia morto. ★

– *Rochelle F. GROSSMAN*

# Okemo 2002: Internacia Semajnfino Esperantista

## La naŭa Internacia Semajnfino Esperantista

La Internacia Semajnfino Esperantista okazis en Okemo, Vermont, de la 12-a ĝis la 14-a de oktobro 2002. Ĉeestis ĉirkaŭ 50 personoj el Novjorkio, Kebekio, aliaj ŝtatoj kaj provincoj, kaj eĉ aliaj landoj. Ĉirkaŭ dek personoj el la novjorka regiono ĉeestis kaj partoprenis. Prelegoj, ludoj, klasoj, manĝoj kaj aliaj distraj aferoj okazis.




Arnold VICTOR instruis la komencantan klason laŭ la Cseh-metodo, ne uzante vortojn el aliaj lingvoj. Boris KOLKER instruis la mezgradan klason, en kio mi partoprenis. Ni analizis tekston el libro skribita de Kolker, *Vojaĝo en Esperanto-lando*.

George BAKER prelegis pri la konstruado de pontoj. Aliaj prelegantoj parolis pri Afriko, Sudameriko, la indiĝenaj nordamerikanoj, la Esperanto-movado, kaj aliaj aferoj.

Ĉe la Interkona Vespero, sabaton nokte, okazis ludoj, kiuj instigis konversaciojn inter personoj, pri diversaj temoj, skribitaj sur paperetoj.

Ĉe la Internacia Vespero, dimanĉon nokte, okazis vespermanĝo, kun manĝaĵoj el diversaj landoj. Poste, okazis muzikaĵoj, deklamado de poemoj, rakontoj kaj ŝercoj, kaj aliaj distraj aferoj.

Pluvis sabaton kaj dimanĉon, sed la suno brilis je la ĝusta tempo, je lundo, kiam ni faris la grupan fotografon. Lundon tagmeze, ses el ni manĝis ĉe la restoracio "Potbelly" en la urbeto Ludlow, Vermont. Tuj poste, ni reiris hejmen. ★

*– Stuart GREEN*

## Amika semajnfino

ESNY-anoj estis naŭ en Okemo ĉi tiun jaron, inkluzive nian malnovan amikon Enrique Ellemberg, nun el Albanio, baldaŭ foren translokiĝonta. La gastoprelganto kaj instruisto estis akademiano d-ro Boris Kolker, kies temoj estis la brile densa *La Esperanto-movado en Rusio* kaj nova eldono de lia instrulibro *Vojaĝo en Esperanto-lando*. Estis aliaj prelegoj kaj oratora konkurso, kun ludoj, kultura vespero kaj festmanĝado.

Partoprenis George Baker, Tomoko Petrov, Maki Sano, Niĵl Blonstein, lernanto Eric Rodriguez, nia protokolisto Stuart Green, nia vicprezidanto Tomaso Leong, kaj mi Arnold Victor, kiu instruis la komencantojn laŭ la Cseh-metodo. Montrealanoj Normando Fleury kaj Zdravka Metz (geedzoj) brile gvidis tre ĝuindan kaj varme amikan semajnfinon spite pluvadon. Estis tie kuraĝiga nombro de gejunuloj. ★

*– Arnold VICTOR*



*La suno brilis je lundo kiam ni faris la grupan fotografon.* FOTIS: MAKI SANO

# Anoncoj, ktp.

## The West Wing

La universala lingvo aperis en la televida programo *The West Wing* (La Okcidenta-Sekcio) je merkredo, la 30-a de oktobro. En la epizodo "Game On" (Matĉo Komenciĝas) okazas debato inter la demokrata prezidento Bartlet (Martin Sheen) kaj lia republikana konkuranto Robert Ritchie (James Brolin). Ritchie diras al Bartlet, ke la demokratoj nur volas malhelpi edukadon, kaj volas devigi lernantojn studi Esperanton.


Nuntempe en Usono okazas debato pri ĉu instrui enmigrantojn per ilia propra lingvo. Instrui universalan lingvon, tamen, estas nova ideo, kiu ŝajnas al mi bona. Zamenhof estus fiera. ★

*– Isaac BRUMER*

## Pri la poemo en la septembra *Prismo*

La redaktoroj bedaŭras, ke kelkaj legantoj de *Al la ĝemelaj turaĉoj* trovas en ĝi politikan mesaĝon. Ni ne konstatas tian mesaĝon, kaj la aŭtoro asertas, ke la poemo estas pura lamento. ★

*– Tom ECCARDT*




*Ne! Malpli da intonacio! Pli da ritmo! Ripetu: "se-vi-deziras-lasi-mesaĝon-premu-unu"*

## Ĉe Unuiĝintaj Nacioj

De la 9-a ĝis la 11-a de septembro mi ĉeestis la 55-an jaran DPI/NGO (Departemento de Publika Informado/Neregistaraj Organizaĵoj) konferencon pri *Building Societies Emerging from Conflict: A Shared Responsibility*. La unuan matenon prelegis HAN Seung-soo, prezidanto de la 56-a sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN, Louise FRECHETTE, anstataŭanta ĝenerala sekretario de UN; Lakhdar BRAHIMI, speciala reprezentanto de la ĝenerala sekretario de UN por Afganistano; Mary ROBINSON, alta komisiito por homrajtoj ĉe UN; kaj reprezentantoj de NROj. La subtemoj de la konferenco estis *Re-establishing the Role of Law and Encouraging Good Governance; Restoring Social Services: Identifying Priorities; From Less Than Zero: The Challenge of Rebuilding Economies; Against The Odds: The Process of Reconciliation; Demobilizing The War Machines: Making Peace Last.* Prelegis multaj stabanoj de UN kaj de diversaj NROj. Tre kortuŝe prelegis la publika prokuroro de la Rwanda kortumo kaj antaŭa infansoldato de Siera Leono. Dum la ferma sesio prelegis Vojislav KOSTUNICA, prezidento de la Federala Respubliko de Jugoslavio, kaj José Luis GUTERRES, vic-ministro de Timor Leste. Krom la formalaj kunvenoj mi ĉeestis ĉiun tagon dum la tagmanĝa horo neformalan diskutgrupon.



La 3-an de oktobro mi ĉeestis la 12-an jarfeston de la Internacia Tago de Pli Aĝaj Personoj. La temo estis *Meeting the Challenges of Ageing: Where Do We Go From Here?* Oni montris belan vidbendon pri la dua Mond-Asembleo pri Aĝado (World Assembly on Ageing), Madrido, 8-12 aprilo 2002. La ĉefpreleganto estis Eveline HÖNIGSPERGER, direktoro de la centro pri aĝado kaj demografia politiko de la federala ministerio pri socia sekureco kaj generacioj, Aŭstrio. Ankaŭ prelegis stabanoj de UN kaj de NROj kaj Madiha EL SAFTY, profesoro pri sociologio ĉe la Amerika Universitato en Kajro, kaj Michiko MUKUNO, direktoro pri la politiko por plej aĝa socio, Japanio. Poste regalis nin per mallonga koncerto Skitch HENDERSON, la fondinto kaj muzikdirektoro de The New York Pops. ★

*– Rochelle F. GROSSMAN*

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Novembro 15**

**ESNY Open House**
*Friday, 6:30 pm at UFT*

**Decembro 1**

**Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM*
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 119)

**20**

**ESNY Zamenhofa Festo**
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**United Federation of Teachers (UFT)**
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

**"IBM" Building Atrium** (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

**K-Café**
Second floor of K-Mart, 770 Broadway, NYC
(entrance at Eighth Street & Fourth Avenue)

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

| Prezidanto | Koresponda Sekretariino | Protokolisto |
|---|---|---|
| Thomas Eccardt (212) 477-6516 | Rochelle F. Grossman (718) 457-1490 | Stuart Green (631) 751-5683 |
| **Vicprezidanto** | **Kasistino** | **Program-Direktoro** |
| Thomas Leong (718) 981-4252 | Sofiya Soskina (914) 738-6084 | Arturo Bonetti (718) 257-6091 |

**Novjorka Prismo**
Numero 118 – Novembro 2002
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

| Redaktoro | Subredaktoroj | Desegnistino |
|---|---|---|
| Jim Medrano (212) 982-5029 | Thomas Eccardt, Nancee Medrano | Mary Pulley |

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com
© 2002 Esperanto Society of New York